

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 66, septembro-oktobro 2023



Universala Esperanto-Asocio

“Alproksimigi la homojn cele al paco” – Mesaĝo de UEA al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Internacia Tago de Paco



Ekde registaroj ĝis ordinaraĵoj, ni ĉiuj devas decidi pri paco. La ĉi-jara temo por la Tago de Paco estas "Agado por paco: Nia ambicio por la Celoj por Daŭripova Evoluigo". Por atingi tiujn Celojn ni bezonas pacon; samtempe la Celoj proponas bazon por daŭripova paco inter popoloj kaj homoj.

La Tago de Paco estas okazo por unuiĝi cele al plifortigo de kulturo de paco. En tiu tago ni petas observon de batalhalto en militoj kaj konfliktoj cele al senperforta solvo de malakordoj. Ni rekonsideru militajn solvojn al disputoj kaj ni subtenu pacon, surbaze de homaj rajtoj kaj malferma dialogo trans lingvaj baroj, kiel pli bonan solvon.

Kiel tamen unueca homaro, ni alfrontas multajn defiojn. Militoj, klimataj ŝanĝoj, malriĉeco, malsano kaj malsato alportas neelteneblajn suferon al milionoj da homoj. Ni bezonas pacon kaj unuiĝon por venki malfacilaĵojn kaj atingi pli justan, egalan kaj sekuran estontecon kie komunikado estas malferma, honesta, kaj egaleca.

Militoj kaj malamikecoj havas materiajn kaj kulturajn kialojn. Por ekfini la materiajn kialojn de konfliktoj necesas redukti malegalecon. Por ekfini la kulturajn kialojn de malamo necesas agnoski nian komunan homecon kaj niajn respondecojn kiel komunaj zorgantoj pri nia planedo. Por komenci tiun alproksimigon, necesas komune paroli kaj, surbaze de tiu konversacio, komune agi, konstrui kaj konservi. La Internacia Lingvo Esperanto, per sia komuna bazo kaj siaj parolantoj tra la tuta mondo, proponas vojon al la unueco en diverseco, kiun la homaro celu.

La kontribuo de Esperanto al paca mondo estas ĝuste alproksimiĝo inter homoj per komuna lingvo, aldone al lokaj kaj naciaj lingvoj. En la movado por Esperanto, ni per interkonatiĝo agnoskas la homecon unu de la alia kaj ni aktive utiligas tiun lingvon ankaŭ subtene al la pacaj celoj de UN kaj specife al la Celoj por Daŭripova Evoluigo. "Per vojo de paco kaj harmonio ni ĉion povas krei", iam diris Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto. Zamenhof ja pravis. Ni do kreu pli bonan mondon por ĉiuj, kie ĉiuj estas bonvenaj kaj ĉiuj havas samajn bazajn rajtojn.

Kongreso de UEA en Italio rezoluciis pri enmigrado

La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.
3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.
5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.
6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.
7. Tial ni estas solidaraĵ kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023

“Tradukistoj kaj interpretistoj estas niaj aliancanoj en superado de lingvaj diferencoj” – Traduka Tago 2023



Unu el la riĉaĵoj de la mondo estas la abundo de lingvoj, kun siaj diversaj kulturaj ecoj kaj siaj diversaj manieroj esprimi la rilatojn de la homaro kun sia ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj tiuj lingvoj gravas, samkiel ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj homoj. Por interkompreniĝo ni bezonas, do, multlingvan aliron, sed aliro kiu samtempe peras inter la lingvoj. Traduki, en sia plej vasta senco, estas alproksimiĝi. Ĝi devenas de nia forta volo dialogi kaj trovi komprenon.

En la 30-a de septembro, ni honoras lingvajn profesiulojn kiuj laboras malantaŭ la kulisoj por faciligi interkompreniĝon kaj antaŭenigi diplomation. Tradukado ebligas rimarkigi plurajn rakontojn, vidpunktojn kaj ideojn pri la sama mondo kie ni vivas.

Per tradukado ni festas nian komunan homecon. Antaŭ gravaj defioj de la homaro, tradukado estas ponto por pripensi pacon kaj sekurecon, por plifortigi multflankismon, por antaŭenigi daŭripovan evoluigon, humanitaran helpon, dignon kaj homajn rajtojn.

Por bone kunlabori, ni bezonas bone kompreni unu la aliajn, en respekta kaj malferma maniero. Ni bezonas bone komuniki kaj, egale grave, bone aŭskulti. Tiel la Universala Esperanto-Asocio, ekzemple, provas uzi Esperanton por trovi pliajn motivojn kaj eblecojn kune vivi en mondo, kie niaj agoj efikas sur la tutan globon. Ni forte admiras tiujn kiuj, laŭ siaj diversaj manieroj, celas redukti la lingvajn barilojn – inkluzive de tiuj tradukistoj kaj interpretistoj kiuj laboras en stato de persona risko, ekzemple en militaj konfliktoj.

Lingvaj rajtoj estas homaj rajtoj -- la rajto esprimi sin per lingvoj kaj lingvouzoj kiujn oni plej bone scipovas. La klopodo traduki estas la klopodo aliri al ĉiuj homoj kaj lasi neniun malantaŭe.

Ni festu samtempe homan lingvan diversecon kaj la laboron por kunigi homojn trans lingvaj diferencoj – por la estonta pluvivo kaj prospero de la planedo.

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.